

# TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

starigas internacian konkurson en la jaro 2008
sub la temo

# Kristnasko: bilde kaj poezie

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **10a de novembre 2008**, siajn verkojn al la jena adreso:

**ESPERANTO TRIESTE - C.P. 601 Trieste Centro**
**IT-34101 TRIESTE - ITALIA**

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorio:

1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio
2) poeziaĵo.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

La poeziaĵo estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- persona kaj familia nomoj;
- poŝta adreso;
- aĝo;
- lernejo kaj klaso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com